



Tri lim-aranĝoj valoraj je 10 poentoj




Diag. 14 (Ĝusta kurso 1-5) Ni revenu al la ludo. Post la interŝanĝoj ek de N1 ĝis B4, Nigro trans-iras al MalSupra MalDekstra angulo kaj ŝtonmetas N5 'minaci'.

{paĝo 189 de la originalo}


Alie, rimarkindaj estas punktoj 'a': 'tranĉi' kaj 'b': 'kapti tri ŝtonojn', tamen ĉiuj estas samvaloraj, do Nigro povus elekti iun ajn.




Diag. 15 Unue ni kalkulu la valoron de ĉi tiu N1. Kontraŭ 'eskapi' B2 Nigro 'sinligas' per N3, kaj...




Diag. 16 Blanko 'suben-iras' kiel B4 kaj Nigro 'forkaptas' per N5. Ĉu vi scias la procedon 'rekapti sur la spuro de forkaptitoj' {japane "ISI NO SITA"(sube de ŝtonoj)}?




Diag. 17 De B6 'minaci' kaj ĝis B8, post kiam Blanko 'forkaptas' nigrajn kvar ŝtonojn,...




Diag. 18 Nigro tranĉas sur la supro de forkapto per N9. Iam poste,...




Diag. 19 metrajton-tenanta estas Blanka 'minaco' B1 kaj Nigro rekaptos la blankajn tri ŝtonojn per N2. Kaj...




Diag. 20 fariĝas ĉi tiu formo. Ĉi tio estas rezulto de Nigra lim-aranĝo.
{paĝo 190 de la originalo}



Diag. 21 Aliflanke, pri Blanka lim-aranĝo; Bone estas 'suben-iri' N1. Sekve,...




Diag. 22 procedas N1 'forkapto' kaj B2 'el-iri'. (En diagramo 21, anstataŭ B1 eblas metordo, B-a 'minaci'~N-b 'forkapti'~N1 'sinligi'.)



Diag. 23 (Blanka lim-aranĝo) Fine, kontraŭ Nigra Ⓞ, Blanko respondas per Ⓞ.


Nun ni respektive kalkulu gajnojn/malgajnojn de ambaŭflankaj teritorioj, komparante inter diagramoj 20 kaj 23. La formoj estas rezulto de forkaptoj, do ne facila estas la kalkulado. Oni povas trovi, ke la gajno/malgajno de Nigra teritorio estas 6 poentoj, kaj tio de Blanka teritorio estas 4 poentoj. Tial la valoro de lim-aranĝo ĉi tie kalkuliĝas je '10 poentoj da diferenco'

Alivorte, en diagramo 20, komparante kun diagramo 23, Nigra teritorio multiĝas je 6 poentoj, kaj Blanka teritorio malmultiĝas je 4 poentoj. Sumigante tiujn kalkuliĝas '10 poentoj da diferenco'.




Diag. 24 Ni antaŭen iru al la 'tranĉo' N1. Se Blanko 'minacus' ĝin per B3, Nigro respondus per N3, kaj rezultus formo malbona por Blanko (Blanko ne povas 'sinligi' per B-a).


{paĝo 191 de la originalo}




Diag. 25 Kontraŭe, Nigro povas metrajton-tenante 'bati' per N1. Iam post 'sinligi' per B2,...



Diag. 26 (Nigra lim-aranĝo) prava estas interŝanĝo de B1 'bloki' kaj N1 'sinligi'. Tion rajtas Blankon.




Diag. 27 Aliflanke, se Blanko lim-aranĝas ĉi tie, en ĉi tiu kazo, ĝuste estas 'diagonale sinligi' per B1. Kontraŭ B2, Blanko 'sinligas' per B3, evitante 'sinĵeti-kaj-rekapti' N3.




Diag. 28 (Blanka lim-aranĝo) Poste, Blanko rajtas 'minaci' per B1 (, ĉar N1 {fari 1 poenton} estus 'metrajton-peradanta'). Nigro sinligas per N2.

Komparu diagramojn 26 kaj 28. Gajno/malgajno de Nigra teritorio estas 7 poentoj kaj tio de Blanko teritorio estas 3 poentoj. Do lim-aranĝo ĉi tie (Nigra 'tranĉo' aŭ Blanko 'diagonala sinligo') kalkuliĝas je '10 poentoj da diferenco'.


{paĝo 192 de la originalo}




Diag. 29 (Ĉu bona formo?) Ni iome devojiĝu jene. Kiam Blanko lim-aranĝas ĉi tie, B1 'salti' estus unuavide esenca. Tamen en ĉi tiu formo,...



Diag. 30 Nigro uzas teknikon de 'sin-oferi' kiel N1 kaj N3, kaj Blanko malgajnas 1 poenton (Finfine Blanko devos 'sinligi' per B-a) .




Diag. 31 (Kia estas ĉi tiu B1?) Ankaŭ malbone estas 'solide sinligi' per B1.




Diag. 32 Procedas N1 'tuŝ-meti'~ B2 'el-bati'~N3 'tranĉi'~B4 'forkapti'. La rezulta formo egalas diagramon 30.

(Ambaŭ en diagramoj 30 kaj 32, Nigro devus ŝtonmeti en ĝusta ŝanco {, kiam pli valoraj lim-aranĝoj 'metrajton-perdantaj' estas jam metitaj}.)

{paĝo 193 de la originalo}



Diag. 33 (Nigra lim-aranĝo) Sekve pri valoro de N1 {'el-iri' kaj N3 'tranĉi'}. Ĉi tio estas facila. Kontraŭ B2, Nigro 'tranĉas' per N3. Komparu tion kun la sekva diagramo.



Diag. 34 (Blanka lim-aranĝo) Kiam Blanko sinligas per ▲, poste Blanko rajtas interŝanĝi ŝtonmetojn, 'el-iri' B1 kaj 'sin-ligi' N2.

Gajno/malgajno de teritorio estas nur 10 poentoj de Nigra teritorio. Do ankaŭ la lim-aranĝo ĉi tie valoras '10 poentojn da diferenco'.